

Promeno en la Esperanto-gazetaro

Iltis-Forumo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.12.07

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Multaj gazetoj kaj revuoj regule atingas nin kaj dum kelkaj elsendoj ni dankos al ties redaktistoj per laŭtleĝo de kelkaj signifaj artikoloj. La pasintan semajnon per citaĵoj el la editorialoj de Reinhard Haupenthal ni prezentis al vi la novan revuon **Iltis-Forumo** kaj ni anoncis al vi, ke ĉisemajne ni revenos al tiu ĉi revuo kultura kaj literatura.

A.- La unua numero de 1991 estas dediĉita al Julio Baghy pere de tre interesa studo de Marjorie Boulton, kiu estis redaktita por la antaŭvidita **Enciklopedio de Esperanto**, kiu ne aperis ĝis nun. Tiel Reinhard Haupenthal enkondukas tiun dekpaĝan studon kaj bibliografion pri Baghy:

Cl.- Kiam, en la 60aj jaroj, mi eklaboris kun Lins super projekto de nova **Enciklopedio de Esperanto**, ni progresis tia-grade, ke la materialoj ĝis la litero C pli-men pretis. Malfeliĉe, preskaŭ nenio el ĉi materialo ĝis nun vidis la lumon de la tago. Pro tio mi kontentas profiti la 100-jaran jubileon de Gyula Baghy por aperigi la studon de Marjorie Boulton pri la lirikisto Baghy. Por la nuna publikigo d-ino Boulton ĝisdatigis sian artikolon per kelkaj ampleksigoj. Ankaŭ mia bibliografio celas ĝisdatecon inkluzivante la lasta-tempajn nov-eldonaĵojn.

A.- Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la vivo kaj verkaro de Julio Baghy nepre akiru tiun numeron unuan de 1991 de la revuo Iltis-Forumo. En ĝi Marjorie Boulton ankaŭ raportas pri alia poeto. Pri la ĉino Armand Su, 1936-1990, kiun kripligis la samlandanoj okaze de la ekcesoj de la maŭisma regado. Jen hodiaŭ ni legas al vi tiun nekrologon artikolon de Marjorie Boulton pri Armand Su:

Cl.- Ni informiĝis el Ĉinio pri la morto, en septembro 1990, de Armand Su, poliglota poeto kaj elstare fidela esperantisto, tragika figuro en nia literatura historio.

A.- Jam kiel lerneĵano li ekstudis eŭropan literaturon, kaj 13-jara li adoptis sian francan nomon pro entuziasmo pri Dumas kaj ties roman-figuro, kaj jam tradukis el la franca kaj angla. Li serioze studis la francan, anglan, rusan, germanan, italan, hispanan, portugalan, nederlandan, polan, svedan, danan, norvegan, ĉeĥan, serbokroatan; li tradukis el diversaj lingvoj kaj verkis originalajn poemojn en la franca, itala kaj angla. Aperis unu volumo de liaj italaj poemoj. Sed ekde sia 18-a jaro li estis esperantisto, kaj en 1965 fariĝis la tiam unika UEA-delegito en Ĉinio.

Cl.- Kun larĝa kulturo, granda sciamo kaj dediĉo al la literaturo, li apenaŭ sukcesis en la ordinaraj direktoj de intelektula vivo, ekzemple li ne sukcesis eniri universitaton aŭ havi bonan postenon. Sed Armand Su ne estis ordinara persono...

A.- Li verkis multajn esperantajn poemojn kaj amikiĝis kun esperantistoj kaj aliaj, tra la mondo, en eksterordinara reto de interesaj, stimulaĵoj kontaktoj. Lia vivo multilate sugestis la vivon de iu romantika poeto de la 19-a jarcento, kun multaj intensaj amoj, internaciaj kulturaj amikecoj, emociaj vojaĝoj. Lia vivo neniam estis tre facila; ekde la 21-a jaro li havis konstante problemojn pri okul-malsano, kaj ne tre prosperis; lia ĝenerala sanstato ne estis bona.

Cl.- Multaj, en multaj landoj, estimis lin, kaj pro tio ili ekestimis Ĉinion; sed la propra lando kruele batis sian filon. Kiam venis la "Kvaropa Bando", brutalaj junuloj batis lin kaj detruis liajn etajn trezorojn - inter tiuj lian buston de Betoveno - kaj finfine li estis arestita kaj kondamnita al dudek jaroj de malliberejo pro sia esperantismo kaj internaciaj kontaktoj. Dum dek teruraj jaroj li suferadis en prizonoj, konsolate nur per la amo de sia kuraĝa patrino kaj mirinda fideleco de sia fianĉino Wang Rui-Xi. Malgraŭ punoj, li restis fidela al Esperanto kaj eĉ kaŝe instruis ĝin en malliberejo mem.

A.- Kiam falis la Kvaropa Bando, Armand Su estis liberigita kaj povis iom refari sian vivon; li edziĝis al la nobla fianĉino, kaj la vivo donis al li almenaŭ duan ĝojon; li havis filinon, Yina, kiun li tre amis. Sed lia neniam forta sano estis tute frakasita; malsanoj progresis, kaj dum siaj lastaj jaroj Armand Su, kies intelekto iam etendis siajn esplorojn al Eŭropo, estis limigita al seĝo, paralizita, finfine ne plu kapabla paroli. La heroa Rui-Xi flegadis lin sindediĉe kaj kun aparta kompreno de liaj senvortaj komunikaĵoj, ĝis lia morto, kvazaŭ ideala figuro el la romantika literaturo, kiun li juna tiel amis... Sed la lastaj jaroj de tiuj du kune estas pli belaj en kontemplado de la nobleco, ol por la du afliktitoj.

Cl.- Mi ne povas multe plori pro la morto de mia multjara amiko Armand Su, aldonas Marjorie Boulton; li liberiĝis de neimageblaj suferoj; ploru tiuj, kiuj turmentadis lin.

A.- Li postlasis ion; mi penas redakti la manuskriptojn (ofte kortuŝe konfuzajn pro malsano) de liaj kolektitaj poemoj; kaj Iltis-eldonejo planas aperigi tiun libron. Ni honoru lian memoron!

Cl.- Nun niaj rigardoj turniĝu al grava funkcio de la revuo iltis-Forumo. La recenzoj legeblaj en la rubriko **recenza forumo** povas esti konsiderataj kiel ĉiam atentindaj. En la tempo al ni ankoraŭ disponebla hodiaŭ ni legos al vi la komencon de recenzo pri la verko de Henri Vatré: **Neologisma Glosaro. Postrikolto al PIV**, eldonita de Iltis en 1989 en la serio **esperantologio**. Jen kion Laŭlum verkas pri la temo neologismoj:

A.- Travivinte 50 jarojn kun Esperanto kaj laborinte 40 jarojn ĉe la redakcio **de E1 Popola Ĉinio**, mi konstatis du tendencojn en la evoluado de la vortaro **de Esperanto**, kiu kreskis el la solfolia listo kun 920 radikoj en la **Unua Libro** en la gigantan 1300-paĝan **PIV**: unu sekvas la ekzemplon de "okulisto" kaj kreis freŝajn vortojn bezonatajn laŭ la leĝo reganta la vortfartadon de la internacia lingvo; aliaj sekvas la ekzemplon "oftalmologo" kaj enkondukis neologismojn el naciaj lingvoj aŭ kreis novvortojn arbitre. Unuj ŝatas diri: "Piedpilko, bone!" Aliaj preferas diri. "Futbalo, aŭ keĵ!"

Cl.- Tiuj, kiuj klopodas ekspluati la latentan vortgeneran povon de Esperanto kreis multajn freŝajn vortojn, kiel ekzemple a-vorto, e-vorto, i-vorto, o-vorto, alsupri, (egalas al ascendi), desupri (egalas al descendi), piedi (egalas al piediri), cidiri (interparoli en intimeco), submondo (egalas al infero), subfervojo (egalas al metroo), vortgalopi (rapideme paroli), movŝtuparo, enigilo kaj eligilo (de elektronika komputilo), zoo (egalas al zoologia ĝardeno), buso (aŭtobuso), ktp., ktp.

A.- Tiuj, kiuj senĝene-senpene-transprene kreis neologismojn, ŝveligis nian vortaron per dube-necesaj vortoj kiel ekzemple ab (egalas al for de), ak... ak (egalas al kaj... kaj), aŭtem (egalas al sed). ktp., ktp.

Cl.- Kian starpunkton vi prenis aŭ volas preni koncerne al tiu afero?

A.- Mia sperto ĉe la redakcio de El Popola Ĉinio devigis min sekvi la ekzemplon de "okulisto". La kaŭzo? **El Popola Ĉinio** estas gazeto kun diverseca enhavo, kaj ni ofte sentas la bezonon de novaj vortoj por diri tion kion ni devas paroli pri kulturo, ekonomio, sciencoj kaj teknikoj. Ni ofte devas nin turni al la granda PIV por trovi solvon. El leteroj de miloj da legantoj ni konstatis, ke al multaj el ili mankas la granda **Plena Ilustrita Vortaro**, kiu estas sufiĉe kara eĉ por eŭropaj aĉetantoj. Sed ni ne povas ne paroli pri pure ĉinaj aferoj, kiel ekzemple **ĉigong, tajĝiĉjŭan, vejĉi, jin, jang**, kaj similaj. Kion fari? Ni devis krei neologismojn kaj aldoni klarigojn kaj notojn al la koncernaj tekstoj. Se oni foliumas la dekojn da jarkolektoj de El Popola Ĉinio, oni povus rikolti nombron da neologismoj pri ĉinaj aferoj.

Cl.- Ni haltigas tie ĉi la leĝadon de tiu recenza artikolo dupaĝa de Laŭlum. Pere de tiu ĉi ekzemplo vi verŝajne komprenis, kiom grava estas tiu rubriko en la revuo **Iltis-Forumo** kaj kiom objektivaj estas tiuj recenzoj eĉ koncerne eldonaĵojn de Iltis mem.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras: Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012